GISTO, MAR-2005.

Georgo Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS.
ttt-kongrua skribo.

INSTRUO ESTIGAS PERDIGXON

Kristanaj eklezioj instruas, skribe kaj parole, ke la homaro estas savita far Jesukristo. Surbaze de tio 95% de la homoj kredas sin rajtigitaj eniri la Chielon sen devoj plenumendaj por atingi sian deziratan celon. Eble tial la amuzema homaro “forgesas” la kristanajn minimumajn devojn. Komercistoj senskalpigas la klientojn per artifike altigitaj prezoj, ofenditoj ricevintaj vangofrapon, ne turnas la aliflankan vangon, neniu pardonas du fojojn, des malpli 70 oble 70 fojojn. Okazas la kontrauo. Ofenditoj nuntempe tuj mortigas, ech surstratan gardiston, se li veturigiston punpagigas au nur avertas lin/sxin pri devojigxo de la regularo.Legxofaristoj verkas legxojn tute favoraj al iliaj privataj interesoj. Kial obei – ili pensas – se Jesuo garantias la Paradizon? – Chu ne estas tempo, ke la Eklezioj sxangxu la diskurson, tiel ke la homoj komprenu gxuste la predikon, sen frazoj kiuj sin mem nuligas? Frazoj tiaj troveblas kutime en la chiudimancha kolumno (en C.P.) de lia kardinala mosxto dom Dadeus Grings. Hodiau 13/8, lia kolumno prezentis jenajn konfuzigajn frazojn:” ...**sem nenhum** interesse” = sen neniu intereso. Alia:”**não** há **nada”** = ne estas nenio. Tiaj sensignifaj esprimoj estas uzataj de politikistoj, por trompi vosxdonantojn. Per tiu ruzajxo neniu rajtas poste protesti, kiam li/sxi ne plenumas siajn promesojn. Memorigas tion la afero ICM=impostoj en nia Provinco-RS..

NE KREDEBLE

Gisto iam informis, ke eblas elsendi 10 minutan tekston E-reklaman en miaurba Radio. Pasis jam eble du monatoj sed neniu manifestigxis. Mi mem ne sufiche spertigxis, por akurate surdiskigi ion. Tia teksto taugos por esti elsendota dum tago kiam unu el nia ekologia brigado estos ne libera por okupi la duonhoron en la radio.

CRI

Nuntempe la radia ondodisvastigxo el Oriente plej favoras lau 9.860 Khc, je la 19,00 horo (22,00 UTC)lau brazila tempo, per signalo S-9. Same ankau en 11.700 Khc sed, iomete malpli forte gxi audeblas. Ne pigru, la 40ª BKE postulas parolkapablon! Se vi auskultas radion, leteras kaj diligente legas, vi certe atingos la celon en gloro kaj la nepoj vin benos!

Ekologie stulta homaro mortigas sin !

Se vi postlasas parencojn, vi sxuldas ne nur zorgi pri ilia estonteco sed ankau memorige tikli chiujn homojn kies atenton vi sukcesas atingi. Rimarkeblas ke la predikoj, ke Dio provizos la homaron, ne plenumigxas.Preskau la tuta rikolto perdigxis. Restas valida, ke oni nur danke pregxu, ech kiam eblas trinki glason da fresxa akvo. Akvo jam ne restas suficha por chiuj popoloj sed chiutage ege multnombrigxas nia stulta homaro. Malgrau tio, religiuloj malkonsentas ke la homoj uzu solvojn kiujn sciencistoj malkovras char Dio donis al ili la kapablon serchesplore eltrovi tiajn solvojn.(Rimedojn neabortigajn.)

GRAVULOJ, NEESPERANTISTOJ

Obee al la Praga manifesto (allogi neesperantistojn) mi insistas, ke LKK de la 40ª BKE ne neglektu antauzorge prepari la eblecon, ke kultaj homoj neesperantistaj havu sxancon cheesti senpage unu vesperan surscenejan distran spektaklon, prefere bonhumuran. La gauchoj, lau mia scio, estus la unuaj enkonduki tian E-reklamilon.

LA E-MOVADO NE STAGNAS.

Lau mia opinio, nia afero mirinde prosperas. Mi klarigas. Oni kalkulu, kiom da entuziasmulo vivas en chiu mezgranda urbo? – Nu, lau la Jarlibro estas dekoj, se oni rajtas kredi ke chiu en la libro estas bona esperantisto. Ne kredu tion! Mi jam trovis unu el tiaj samideanoj kiu ne kuragxas diri almenau kelkajn salutvortojn. Tamen, mi restas optimisto. Kvankam aktivuloj ja estas ege malmultaj, eventoj okazas danke al nelacigeblaj piochantoj. Pigruloj, same kiel perfiduloj dum strikoj, senskrupule gxuas la konkeritajn laurojn.

Bonhumuro

DE LA BIBLIO.

Ulo sola, tranoktas en hotelo. Pluvoza vetero, li decidis ne surstratumi. Li malfermas tirkestojn serche de legajxo. Li trovas malnovan Biblion, legas gxis Morfeu anoncigxis sed, antau ol flankenmeti gxin li trovas manskriban tekston: “Malena, de la akceptejo, junulino, speciale favoras gastojn”. Li kontaktas. Ino respondas “Chu vi bezonas ion? – Ho, vi havas tre agrablan vochon”. Komencigxas babilado. Kiel vi nomigxas, kiom vi agxas kaj tiel dauris la parolturno pri sxi, pri li. Li mendis lunchon kaj petis ke sxi mem alportu gxin al li. Seksumado okazis. Dume, sxi certagrade plendas kontrau sin mem: ni apenau konatigxis kaj, jen, jam okazis! - Li diris:

- Mi sciis, ke tio okazos.

-Sciis?...sed, kiel?

- De la Biblio.

-Chu vere, sur kiu pagxo, en kiu ero?

- Ne, ne. Sur la lasta kovrilpagxo legeblis: “Malena, krom charma, sxi estas bonanima kaj servema, provu!

ROMANTISMO CHIAM

Grizula geo kusxas en la lito. La edzino chivespere ne kontentas pro la distanco inter ili kaj diras:

-Kiam ni estis junaj, vi kutimis teni mian manon en la lito.

Li hezitas sed post momento li etendas la brakon kaj enmanigas sxian manon. Sxi ne kontentas kaj diras:

- Kiam ni estis junaj, vi kutimis alkrochigxi al mi.

Nun iom pli longa hezito sed, fine li iel grumblas kaj malfacile turnas sian korpon al sxi kaj plejeble proksimigxas al sia edzino. Sed, sxi ankorau nekontenta, diras:

- Kiam ni estis junaj, vi kutimis mordeti mian orelon.

Li audige suspiras, flanken jxetas la litkovrilon kaj subite ellitigxas. Sxi ofendigxis kaj laute krias:

- Kien vi iras?

Elgxemante malpaciencon, li diras: mi prenos kaj remetos mian dentan protezon.